**EKO**

**Esperiga Komuniko**

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

## Enhavo


- Sciencemuloj Scivolu pri Scivolemo
- Litovio eluzas bibliotekojn
- Esperantisto de la Jaro
- TEJO kun strategio kaj agado
- AMO-materialo de 2020 spektebla!



*EKO 2020-60 sendita el Budapeŝto, la 30an de decembro*

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Pli ol dumil kun plusendoj.*



Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA


# Scivolemo: laŭdinda scienca retejo

Delonge ni priploras la neaktiveco de nia sciance faka asocio ISAE. Tio ne signifas, ke nenio okazas! Kiel ni konstatas en pluraj kampoj – bravaj unuopuloj kuniĝas por agi pozitive, preter la tradiciaj kanaloj. Jen pruvo pri tio!

Pretas 16 filmetoj: https://www.youtube.com/channel/UCJy1LAuTnZjrov6QFWSagug

Dekstre klaku al: ABONU; manke de tio klaku la krokodilan *SUBSCRIBE*.

Momente videblaj filmoj estas: Sanmasko, sunaj cikloj, ekesto de la alpoj, palenke: la majaa ruina urbo, jupitero, hipokampoj, katoj. Ludlistoj estas: Medicino, Antropologio, Historio kaj Bestoj. Mem esploru kaj subtenu!

Esperanto estas kreskanta lingvo kun multe da potenco, sed kvankam ĝi floras kiam temas pri socia agado aŭ lingvaj debatoj, scienco estas tereno, kiu ne sufiĉe estas esplorata. Kiel paŝo en la ĝusta direkto, ĉi tiu kanalo disvastigas vidbendgitajn artikolojn de la blogo *Scivolemo*. Tiel la celo unua estas diversigi la materialon, kiun la lingvo povas oferti.

Nuntempe ni estas nur malmultaj, sed tio ne signifas ke nia teamo plenas. Ni daŭre serĉas samideanojn kiuj emas helpi per iliaj lertecoj. Ĉu vi volas? Kontaktu nin! Ni estas profesie nek sciencistoj nek filmistoj. Tio signifas ke kritikoj kaj sugestoj ĉiam estas bonvenaj. Ĝuu la spektadon kaj legadon en https://scivolemo.wordpress.com !

Scivolemo

# Kvin jaroj da ekspoziciado en Litovio

Ekde aŭgusto 2017 ekspozicio pri la vivo kaj agado de Ludoviko Zamenhof, preparita de Pola instituto en Vilno kunlabore kun Litova Esperanto-Asocio (LEA) okaze de la centa mortodato de Zamenhof, jam sukcesis esti ekspoziciita en 22 lokoj de Litovio. Ĝi konsistas el 22 grandformataj standoj kaj detale prezentas la vivon kaj agadon de Zamenhof kaj Esperanton. Kvar standoj estas dediĉitaj al Esperanto en Litovio.




Ĉi-jare la ekspozicio estis aranĝita en la kulturcentro de Trakai, en la publika biblioteko de Kaišiadorys, en la publika biblioteko de Jurbarkas, en la publika biblioteko de Tauragė kaj en la publika biblioteko de Šilalė. En oktobro ĝi ekfunkciis en la kulturcentro de Šakiai. Ekde la 10a de novembro ĝi estos eksponata en la Kulturcentro de Marijampolė. La ekspozicion en ĉiu urbo kaj distrikto akompanas ampleksaj artikoloj pri Zamenhof, pri Esperanto, pri la agado de LEA, pri famaj homoj kaj Esperanto k. s. en lokaj ĵurnaloj, en urbaj kaj distriktaj retejoj kaj en la retejoj de tiuj instancoj, kie okazas la ekspozicio. Danke al tio pri Esperanto ekscias vasta loka publiko, ne nur la vizitantoj de la ekspozicio. Laŭplane la ekspozicio devas esti montrita en ĉiuj grandaj urboj de Litovio, inkluzive de ĉiuj distriktaj centroj, entute en pli ol 60 lokoj. Tio daŭros pli ol kvin jarojn.

**Povilas Jegorovas**

*La Ondo de Esperanto*, 2020, №3 (305).

# Konvena informo fine de 2020!



Fernando Maia Jr., 37-jara brazila geologo kaj vicprezidanto de UEA, estas elektita la Esperantisto de la Jaro 2020. La rezulton de la voĉdonado kadre de la 21aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj anoncis la sekretario de la internacia elektokomisiono Paweł Fischer-Kotowski. Ni gratulas la laŭreaton, kiu estas la unua sudamerikano kun ĉi tiu honoratitolo! Legu pli en La Ondo de Esperanto https://sezonoj.ru/2020/12/jaro-4/

EKO gratulas pro tiu decido. Plurkiale meritata, ĉefe la elstara sukceso de la Monda Fest'!

Foto: Anna Striganova

# 60 komunikoj ene de unu jaro

Depost septembro 2013 aperis entute 295 komunikoj en la EKO-serio. La pandemio kaŭzis, ke kontraŭ-atende ni aperigis 60 komunikojn tra la jaro, ĉar la reta kontaktado devis anstataui la fizikan. EKO pluiros en 2021, kune kun la subteno de UEA kaj ILEI, kun iome nova vesto. Kiom da komunikoj necesos au utilos? Kune, ni vidu. Por tiuj, kiuj uzas nian kalendaron, EKO bondeziras al vi ĝojan novan jaron – estu ĝi nun iom malpli tumulta ol la forpasanta!




## Strategia ĉe TEJO

https://www.tejo.org/la-strategia-plano-de-tejo-enmovade-2/

Iru tien por spekti prezenton de la prezidanto de TEJO, Charlotte Scherping, pri tiu temo. Plus pliaj interesaj eroj prezentitaj de du pliaj estraraninoj de la Organizo: Snehaja Venkatesh pri la scienca agado de TEJO kaj Manuela Bulghelea pri la universitata agado.

# AMO 2020 enhavoj - alireblaj per <aktivulo.net>

Pli frue hodiaŭ la prizorganto de la publike alirebla retejo <aktivulo.net>, Dima Ŝevŝenko, anoncis, ke la sendita materialo aperis. Por vidi ĝin, iru al:

http://aktivulo.net/eo/enhavo/amo-virtuale

El la enirpaĝo, vi trovas ĝin plej dekstre sub “AMO virtuala”. Por nun la alia rubriko “Aktivula Maturigo servas nur kiel arĥivejo por AMO de 2014 ĝis 2017.

Danke al la vitualeco de ĉiu seminario krom la unua, la centra administrejo ricevis pli grandan kvanton da materialo. Ende de ĉiu unuopa seminario, la eroj aperas kiel enretigitaj PDF-dokumentoj. Tiru la ekranon suben ene de ĉiu dokumenton por vidi la subajn paĝojn.

Por AMO 66 ni esperas ricevi materialojn de ILEI, kiu gastigis la seminarion ene de ilia virtuala kongreso VEKI. Por AMO 68 ni ja havas prezentaĵon ankaŭ de la Esperanto-Centro Herzberg. Pro ĝia pezo (9MB eĉ post sveltigo) ĝi ne estis dissendita kun EKO, nek aldonita al la retejo. Laŭpete ĝi estas ricevebla.

============= vortoj: 800 ==============

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/33. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.